

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni prezentis al vi la novan organizaĵon Monda Juĝistara Asocio. Nefakuloj kiel ni, kiuj ankaŭ deziras favori la disvolviĝon de monda juro supernacia, povas labori en diversaj movadoj. Unu el la plej gravaj estas la Monda Federalista Unuiĝo.

A.- En la franclingva organo *Monde uni* de tiu movado, ni trovis artikolon, kiu povas helpi la esperantistojn konsciiĝi pri sia humanisma rolo.

Cl.- Temas pri intervjuo far Jean Prédine de gesinjoroj André kaj Mathilde Niel, du eseistoj, kiuj provas priskribi la humanismon, kiu nun necesas al mondo. En ĝi juro anstataŭ perforton en la interpopolaj rilatoj.

A.- La tuta intervjuo valorus esperantigon. Bedaŭrinde niaj elsendoj tro kurtas por ebligi tion. Pro tio ni kontentiĝas traduki al vi citaĵojn el tiu artikolo titolita *La nova humanismo aŭ ekal vivanta humanismo*.

Cl.- Aŭdante la dirojn de tiuj du francaj pensuloj, ni nepre rememoru pri la zamenhofaj proklamoj pri homaranismo, kiuj antaŭ kvindek jaroj malfermis en Esperantujo debaton, kiu nun ofte pli viglas ekster nia movado, ol en la esperantaj medioj. Tamen vi rimarkos, ke Esperantujo ne nur simbolas, sed ankaŭ konkretigas en la nuna vivo multajn asertojn de gesinjoroj André kaj Mathilde Niel. Ni donu al ili la parolon :

A.- « *Humanismo ne plu devas esti komprenata kiel signo de intelekta aristokratiismo. Ni, la homoj, alfruntas tujajn kaj timigajn danĝerojn. La homoj estas minacataj korpe kaj anime : ili ekkonas pli kaj pli nestabilecon, naŭzon, deprimon. Nia teknikista civilizo estas minacata de malapero ne nur pro la armada konkuro, sed ankaŭ pro iu vertiĝo al produktado, al pasia kaj neniam sata serĉemo, pro vertiĝo al komfortemo kaj profitemo. Robotigo de la laboristaro, senhumanigo de la edukado, ĉiopoveco de la propagandoj, tio igas la demokratecon iluzio.*

Cl.- *Tiu entuta situacio estas rezulto de egotismo, aŭ por uzi pli simplajn vortojn, la rezulto de adorado de la propra persono, de kulto de la propra mio, de la servado al siaj pasioj. Tiu situacio estas ankaŭ la rezulto de regemaj formoj de la penso. Anstataŭ serĉi la veron, ni provas trudi nian propran veron al la ceteruloj.*

A.- *La humanismo devas renoviĝi por sukcesi liberigi la homojn nun sklavoj de siaj pasioj. Ĝis nun, konstatas André Niel, la plej belegajn idealojn servis ordinare homoj turmentataj de instinktoj al perfortemo kaj regemo. La bonaj intencoj tiel produktis plorindajn rezultojn. Sed hodiaŭ, kiam gigantas la materiaj rimedoj oferataj je servo de la pasioj, ni troviĝas antaŭ ek-katastrofo.*

Cl.- *Nin konfrontas amas-problemo. Ne plu temas pri savo de kelkaj valorajoj de rafinita civilizado profite al eminentularo, temas pri protekto de la vivo mem de la specio. Tial necesas eligi la individuojn el la mensaj prizonoj, en kiuj ili mem enŝlosiĝis, por konduki ilin al komprenema kaj konstrua solidareco.*

A.- *Tiu nova kulturo, kiel la eksperimento jam montris, neniel postulas de ĉiu superajn intelektajn konojn, sed konsciiĝon pro kelkaj simplaj leĝoj, kiuj regas la homojn kaj la societojn.*

Cl.- *La starigo de monda societo estas unu el la grandaj celoj de la nova humanismo. Tiurilate sinjorino Mathilde Niel opinias, ke ne ekzistos homarana societo, se tiuj, kiuj ĝin*

*pretigas, ne komencas per propra persona humaniĝo kaj ne formas inter si konkrete unuigitan societeton, societeton progresanta dank'al kaj per la dialogo.*

A.- Tiu priskribo far Mathilde Niel de la funkcio de la homaranoj helpas nin pli bone kompreni la rolon de la esperanta movado kaj de ĉiuj ceteraj universalaj organizaĵoj.

Cl.- *Se la homoj restas viktimoj de siaj antikvaj egocentrismaj kaj malamaj refleksoj, tiam ili mem detruos tion, kion ili estas konstruintaj ĝis hodiaŭ*, aldonas Mathilde Niel.

A.- Gesinjoroj Niel, kiel la juĝisto Warren, pri kiu ni raportis la pasintan semajnon, pensas, ke la homaro troviĝas antaŭ pens-mutacio. Tradiciaj fortoj laboras ekde jarcentoj por trudi kutimojn, kredojn, politikajn konceptojn. Unue neniam unu el tiuj fortoj venkos super la aliajn, kaj cetere la homoj devas emancipiĝi el ili kaj rezigni pri ĉia apriora decido.

Cl.- *Tiu necesa mutacio ne efektiviĝos sammomente kaj ĉie kune. Ĝi pretiĝas en plej diversaj rondoj, en grupoj de liberaj kaj serĉemaj homoj kapablaj labori kolektive sen fali en la paralizigan sulkon de la influ-luktoj aŭ de la ideologiaj konfliktoj.*

A.- Gesinjoroj Niel proklamas, ke nun multas en la mondo viroj kaj virinoj maturaj por tiu formo de agema amikeco.

Cl.- Ili ankaŭ konstatas, ke la homoj ne ankoraŭ maturaj por tiu formo de agema amikeco ne plu kredas je siaj idoloj, tiel vigle, kiel kredis la pasintaj generacioj. La nunaj homoj sur la tero ekrezignas pri absolutaj kredoj pri la supereco de la propra Nacio, Raso kaj ŝtata Potenco, ktp. Oni ŝatas iri al la konkreto, al la realo kaj forlasas la dogmajn ideojn. Tio signifas krizon. Pri ĝi lamentadas la spiritoj ne maturaj al la necesa mutacio kaj pri ĝi nur povas ĝoji la homaranoj.

A.- En la mondo nun ekzistas centoj da pensuloj, kiel gesinjoroj Niel, kiuj anoncas novan mondkoncepton. La tasko de la esperantistoj estas malkovri kaj diskonigi ilin tra la tuta mondo kaj studi iliajn verkojn. Jen bela programo por niaj kongresoj.

Cl.- Vi aŭdis Radio-Svislandon. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-